

Eŭropa Dokumentaro, eldonaĵo de Eŭropa Centro de Kulturo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 557, 1974.06.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni hodiaŭ prezentos al vi provon eldoni novan revuon en Esperanto. Ĝia nomo : *Eŭropa Dokumentaro*. Ĝia eldonanto : **Eŭropa Centro de Kulturo**, kies sekretario troviĝas en Ĝenevo.

A.- Eŭropa Centro de Kulturo ne estas esperanto-organizaĵo. Ĝi okupiĝas pri eŭropaj aferoj. Unu el ĝiaj celoj estas la edukado de la infanoj favore al eŭropa civitanismo. Ĝuste la menciita revuo *Eŭropa Dokumentaro* kampanjas favore al eŭropo-civitanisma edukado.

Cl.- La provnumero aperigis tri artikolojn plus historian resumon titolitan *Paŝoj al eŭropa unueciĝo*. La svisa verkisto Denis de Rougemont, kiu estas konata pro sia batalado favore al eŭropa federalismo, estas la aŭtoro de la unua artikolo titolita *La sorto de la jaro 2000 estas decidata en niaj lernejoj*. Tiu sep-paĝa teksto memorigas, ke la lernejoj ĝis nun formadis civitanojn nur por la koncerna nacio. Fariĝas ĉiam pli urĝe necese formadi civitanojn, kiuj estos kapablaj konstrui eŭropan federacion. Pro tio ili devas akiri mondpercepton pli larĝan ol la nacian.

A.- Artikolo de G. F. Makking, nederlanda biologo kaj esperantisto, provis pritrakti la temon *Lingvo-instruado post la jaro 2000*. Temas tre bedaŭrinde pri supraĵa studo neniel konvinkiga. Ĝia argumentado respegulas la ĝeneralan vidpunkton de la esperantistaro.

Cl.- De Richard Tames, brito, aperis studo, aŭ pli bone dirite, kelkaj rimarkoj kaj sugestoj por ekkompreno de **la problemoj**, kiuj rilatas al la starigo de **Eŭropa Parlamento**. Ni havas la impreson, ke tiu teksto estis verŝajne malbone tradukita, kaj ke eble pro tio ĝi perdis grandan parton de sia intereso.

A.- Tiu impreso de malbona tradukado karakterizas la tutan revuon. Ni esperas, ke la eldonanto de tiu nova revuo kapablos ricevi la helpon de pli lertaj kunlaborantoj, sen tio ili iros al seniluziiĝoj.

Cl.- Estas anoncote, ke en 1974 aperos ankoraŭ 3 numeroj de *Eŭropa Dokumentaro*, tio en majo, oktobro kaj decembro. Ili aperigos artikolojn pri la ĉisekvaj temoj : Nunaj tendencoj en la okcident-eŭropa edukado ; Alpoj – Eŭropa Montaro ; Rilatoj inter Oriento kaj Okcidento ; Turismo en Eŭropo aŭ eŭropa turismo ; Politikaj partioj en okcidenta Eŭropo ; Eŭropo kaj Usono : ekonomiaj rilatoj ; Gastlaboristoj en Eŭropo ; La Komunuma Organizo en Eŭropo.

A.- Jen interesa programo, kiu meritas apogon, des pli ke tiun novan revuon ne eldonas esperanto-organizaĵo. La esperanta gazetaro estas sufiĉe monotona, ĉar antaŭ ĉio ĝia rolo estas pritrakti problemojn, kiuj rekte rilatas kun Esperanto kaj ties movado. Revuo kiel *Eŭropa Dokumentaro*, kies horizonto estas pli larĝa, povus alporti iom da freŝa aero en nian gazetan literaturon.

Cl.- Oni bonvolu nin bone kompreni. Per tiuj diroj ni neniel kritikis la enhavon de la esperanta gazetaro. Tiuj periodaĵoj havas precizan rolon : respeguli la priokupojn de la esperantistaro. Ili estas nepre necesaj. Sed ankaŭ aliaj revuoj estas necesaj. La daŭra sukceso de organo kiel *El Popola Ĉinio* atestas, ke bone verkita gazeto neprimovada povas akiri

legantaron. Tamen la neprimovadaj revuoj, por povi havi longan vivon, devas esti lingve senriproĉaj kaj devas kalkuli je la neŭtrala sinteno de la esperantistaro. Ili devas povi trovi fincan subtenon eksteran al la esperanto-movado mem. La esperantistaro subtenas jam sufiĉe da pioniraj entreprenoj, pro tio ĝi malfacile akceptas pozitive respondi por agadoj ne nepre necesaj.

A.- *Eŭropa Dokumentaro* iros al bankroto kaj elreviĝo, se ĝi celas varbi la necesan abonantaron nur interne de la esperanto-movado. La peresperanta varbagado devas esti akompanata de poresperanta agado en la eldon-movado mem. Nur tiam la esperantistaro sentos sin ligita al la entreprenita agado. Eŭropa Centro de Kulturo malsukcesos, se ĝi ne bone komprenas tion. Paralele al la provo varbi esperantistan abonantaron al *Eŭropa Dokumentaro*, Eŭropa Centro de Kulturo ankaŭ devas informadi sian membraron pri esperanto kaj ties avantaĝoj. Ĝi devas instigi sian membraron al esperantiĝo. Laŭ nia ĝisnuna informado tiu duflanka agado ne okazis.

Cl.- La esperantistaro estas ja latentaj publiko por plej diversaj agadoj. Ĝi konscias, ke tiel konsideras ĝin la eksteraj komercaj kaj politikaj organizaĵoj. Estas interese ekzameni la psikologion de la esperanto-movado. Ĝi ĉiam reagis negative, kiam ĝi havis la impreson esti ekspluatata profite al varbkampanjoj por ekstermovadaj celoj. Tio estas taŭga defend-metodo.

A.- La lanĉantoj de la nova revuo *Eŭropa Dokumentaro* tion sufiĉe frue komprenu. Eŭropa Centro de Kulturo ne pasive atendu nuran apogon de la esperantistaro. Tio estus granda iluzio, kiu respegulus, ke ĝi estis preta nur por peresperanta kampanjo, kaj ne ankoraŭ al poresperanta. Tion la esperantistaro neniam longdaŭre subtenos.

Cl.- La venontan semajnon, kvankam tiu teksto ŝajnas al ni supraĵe tradukita, ni legos al vi citaĵojn el la artikolo de Denis de Rougemont : *La sorto de la jaro 2000 estas decidata en niaj lernejoj*.

A.- Tiam ni refoje havos la okazon kuraĝigi vin aboni la revuon *Eŭropa Dokumentaro*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!